


Brazila Esperantisto

638-641

Majo/Augusto
1967

61-a jaro

Alberto Couto Fernandes kun senlima sindono prezidis Brazilan Esperanto-Ligon dum 37 jaroj (1909 - 1946)



Everardo Backheuser, profesoro kaj eminenta verkisto, unua prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo (1907 - 1909)

Liga Brasileira de Esperanto

Balancete referente a 1966

Receita

Saldo em 1965	104
Assinaturas	313.940
Comissões	250.800
Congresso	84.000
Contribuições	5.495.700
Cursos	907.350
Despesas de sede (B.K.E.)	100.000
Diversas receitas	1.234.768
Donativos	143.400
Serviço de livros	4.084.893
	12.614.955

Despesa

Assinaturas	168.495
Biblioteca	132.500
Comissões	338.200
Congresso	619.438
Cursos	102.160
Despesas de sede	1.614.310
Diversas despesas	369.794
Franquia	105.000
Informação	186.448
Instalação	102.000
Material de expediente	39.260
Quotas U.E.A.	2.843.100
Revista	872.300
Serviços de livros	4.009.825
Serviço de secretaria	1.112.000
Saldo para 1967	125
	12.614.955

Rio de Janeiro, 2 de janeiro de 1967.

(as.) *Irani Baggi de Araújo*
Tesoureira

PRIVILEGIA VOJO

V. Setälä

O livro recomendado pela U.E.A. para o ensino universal pelo método direto. Com folha suplementar de instruções em português. Ilust. NCr\$ 3,00.

Majo-Augusto 1967

61-a Jaro

N.º 638-641

BRAZILA ESPERANTISTO

("O Esperantista Brasileiro")

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara

dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 2.º

Telefone: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZIL

Senpaga por anoj de B. E. L.

Eksterlande: 18 steloj aŭ 15

respondkuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO 1967

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto"	8,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	25,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	35,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	60,00
Patrão: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vezes a quota dêste.	
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vezes a quota dêste.	

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB

Liga Brasileira de Esperanto

1907 — 1967

Há sessenta anos, em 21 de Julho de 1907, um grupo de dedicados esperantistas fundava no Rio de Janeiro a Liga Esperantista Brasileira, desde 1949 Liga Brasileira de Esperanto. Mais velho do que ela, já existia nesta cidade o *Brazilia Klubo "Esperanto"*. Outros núcleos esperantistas tinham-se formado em Campinas, em Pôrto Alegre, em Niterói, e a Liga, entre outros fins visava a congregá-los.

De então por diante o movimento esperantista brasileiro se desenvolveu sempre em torno da Liga, distinguindo-se em primeira plana na América e equiparando-se aos mais notáveis da Europa. Já em 1907, Zamenhof numa das suas *Leteroj* coligidas por Waringhien, alude ao movimento no Brasil.

Dois brasileiros ilustres são principalmente responsáveis pela marcha do Esperanto em nosso país. Everardo Backheuser, brilhante professor, orador, jornalista, escritor, colocou a Língua Internacional em alto nível de consideração e respeitabilidade, que nem sempre foi atingido alhures; Alberto Couto Fernandes, homem de singular sedução pessoal e de reconhecido prestígio social, pela sua extraordinária tenacidade, foi o indiscutido consolidador do movimento. Backheuser presidiu a Liga de 1907 a 1909 e Couto Fernandes de 1909 a 1946.

O movimento ainda hoje é beneficiado pelo trabalho de ambos. E se é dever dos esperantistas actuais render-lhes comovidas homenagens, também nos cumpre zelar para que o Esperanto seja mantido no mesmo nível de conceito perante o público.

Na *Enciklopedio de Esperanto* são assinaladas sumariamente as circunstâncias que, além das reinantes em todo o mundo, obstam a mais rápida difusão da Língua Internacional. No vasto terri-

tório brasileiro fala-se uma única língua, ao passo que Meillet conta para a Europa 120 idiomas falados. A língua dos países vizinhos pode ser entendida pelo brasileiro com bastante facilidade. Assim, a necessidade prática do Esperanto não se sente tão ao vivo.

Por outro lado, sendo o Esperanto evidentemente um facto de cultura, não é possível deixar de reconhecer a nossa ainda ponderável deficiência neste campo. Essa própria deficiência cultural gera o imediatismo, que decerto não é propício à disseminação da Língua Internacional.

Durante as seis décadas vencidas a Liga tem concentrado as suas melhores energias no ensino da língua, na edição de livros e no fortalecimento dos quadros internacionais.

Ministrando cursos por correspondência e intimamente colaborando com as instituições esperantistas do país, a Liga já distribuiu cerca de dez mil diplomas, conferidos em nome da Academia de Esperanto, o que lhes assegura validade mundial.

Cônscia de que ainda não chegou o tempo de se interessarem realmente pelo Esperanto os editores profissionais, a Liga tem publicado obras didáticas e de literatura que conquistaram o apreço do mundo esperantista. O *Curso de Esperanto em 20 Lições* conta com 7 edições e continua a sua útil carreira. A *Antologio de Brazilaj Rakontoj*, o *Teatro de Machado de Assis*, a *Vidvineto de Alencar* são importantes instrumentos de divulgação do Brasil. Entendendo que o Esperanto não é idioma de uma seita, mas de toda a humanidade, a Liga tem buscado o apoio de respeitáveis entidades para a edição de obras. Assim foi a Casa de Rui Barbosa e com a Universidade Federal da Bahia, ambas do Ministério da Educação e Cultura.

Mais de vinte obras saíram do Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística, para todas as quais cooperou decididamente a Liga. Uma dezena de livros já prontos deverão aparecer em futuro mais ou menos próximo no Fundo de Edições que a Liga vem realizando.

Nas campanhas promovidas pela Associação Universal de Esperanto, inclusive a da UNESCO em 1954 e a da ONU em 1966 foi decisiva a participação da Liga.

A nossa contribuição para o movimento mundial é expressa em números que correspondem a cerca de 4% do total de 84 países e cerca de 73% de toda a América Latina. O Brasil venceu em 1951 e novamente em 1952 o Concurso Internacional de número de membros. Precisamente por essa época adveio uma circunstância notória que ainda perdura, e que vem impedindo a repetição do belo feito. Cumpre sempre confiar no futuro.

A rede de Delegados constitui a mais eloqüente prova de que o Esperanto existe e funciona. Neste particular o Brasil ocupa o 8.º lugar entre 62 países.

A biblioteca, a mais rica da América, e o Serviço de Livros tem posição de relêvo entre os similares estrangeiros.

O órgão oficial da Liga, *Brazila Esperantisto*, figura entre os 7 periódicos mais antigos ainda em circulação. Vários assinantes do exterior atestam a simpatia de que êle goza.

Deve ser aqui registrado o favor oficial que a Liga tem invariavelmente recebido. Há várias leis, federais, estaduais e municipais, que prestigiam o Esperanto. Diversas instituições esperantistas têm sido subvencionadas pelos cofres públicos. Depois da França é o Brasil o país que possui maior número de ruas com o nome Zamenhof ou Esperanto. Todos os Congressos Brasileiros têm recebido o patrocínio de autoridades, notadamente da Reitoria das Universidades. O Conselho Federal de Educação decidiu que o Esperanto pode ser ensinado como prática educativa nas escolas de grau médio. O Governo Brasileiro tem-se feito representar em quase toda a série de Congressos Universais.

Se, como é natural, ainda não foi possível tornar o Esperanto sabido de todos, ou até de grande parte da população, é facto incontestável que ninguém ignora do que se trata. Esperan-

to é têrmo da língua comum, que está registrado em todos os dicionários. Na linguagem usual Esperanto significa mesmo qualquer coisa que se usa ou que se entende internacionalmente.

É contínuo o trabalho de informação que fazem os esperantistas pela imprensa, e pelo rádio, e agora em certa escala pela televisão.

A festa de toda essa atividade se tem sempre achado a pioneira Liga Brasileira de Esperanto. Dois factos indiscutíveis a confortam e a estimulam, como veremos a seguir.

Todos os esperantistas brasileiros, no sentido da definição do 1.º Congresso Universal, têm feito parte do seu quadro social. Para citar somente dentre os mortos: Baggi de Araújo, Nerval de Gouveia, Nuno Baena, João Keating, Tobias Leite, Cristiano Kreamer, Duarte da Silveira, Domingos Perdigão, Demócrito Rocha, Arruda Beltrão, Alcebiades Pais, Medeiros e Albuquerque, Moreira Guimarães, Portilho Bentes, Metódio Maranhão, Quirino de Oliveira, Araújo Primo, Silveira Sobrinho, Odilon Araújo, Odilo Pinto, Carlos Veloso, Alcindo Terra, José Tostá, Abel Gomes, João Ernesto, Teixeira de Freitas, Azevedo Coutinho, Hernani Mendes, Heitor Beltrão, Pôrto Carreiro Neto, Giovanni Faraco, Sebastião Augusto, Benjamin Camozato, Júlia Fernandes, Maria Luísa Bocaiuva, Ester Bloomfield, Balbina de Moraes, Lila Teixeira e tantos e tantos outros que honraram as nossas fileiras e cuja memória é reverenciada nesta nota comemorativa do 60.º aniversário da Liga.

Outro facto que cumpre assinalar é que tudo o que se tem feito em matéria de Esperanto no Brasil nesses sessenta anos tem base, próxima ou remota, nos trabalhos da Liga, no seu prestígio, no seu quadro social, nas suas publicações, enfim na construção por ela iniciada e prosseguida dia a dia, sem desfalecimento, sem se extraviar em atividades laterais.

Bastam à Liga Brasileira de Esperanto esses dois factos capitais para ficar certa de que realizou plenamente os fins para que foi criada em 1907, tendo nesse longo período tido sempre em mente a lição de Zamenhof:

*Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankigante
Ni iru la vojon celitan!*

Festo Honore al Zamenhof

Traduka konkurso, oratora konkurso kaj radia dissendo estis la ĉefaj eroj de la programo organizita de Brazilia Esperanto-Ligo en kunlaboro kun Brazilia Klubo "Esperanto" honore al la kvindekjara datreveno de la forpaso de L. L. Zamenhof okazinta en Aprilo lasta.

La programo konsistis el kvar kunvenoj en la sidejo de Brazilia Esperanto-Ligo ĉiuj sabate je la 4-a horo.

Unua Kunveno

La unua kunveno okazis la 8-an de Aprilo kaj estis malfermita de Ing. Floriano Pessoa, Unua Sekretario de B.E.L. kiu per simplaj paroloj rememoris la vivon de Zamenhof per citaĵoj el *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*. Poste estis legitaj de anoj de B.E.L. eroj el la verkoj de Zamenhof, kiaj: *La gaja migranto* (S-ino Marcelina de Azevedo Carneiro), *Deklaracio pri Esperantismo* (S-ro Luiz Alberto Martins), *En nord' unu pino* (S-ino Izaltina de Oliveira Moreira) kaj *La skribmaŝino de mia patro* el Esperanta Krestomatio (S-ro Pablo Caseillas Rigo). F-ino Irani Baggi de Arauto, kasistino de B.E.L. legis ĉapitron de la verko *Coisas do Esperanto* (Esperantaĵoj) de Saldanha Carreira, eminenta portugala pioniro.

En tiu ĉi kunveno oni elektis *Deklaracion pri Esperantismo* kiel tekston por la traduka konkurso.

Parolado de Prof. Mello e Sousa

En la 15-a de Aprilo havis lokon parolado de Prof. J. B. Mello e Sousa, kiu rakontis pri siaj impresoj, kiam en 1910 en Vaŝington konatiĝis kun L.L. Zamenhof.

La parolado vekis intereson, ĉar Prof. Mello e Sousa estas nun la sola vivanta brazilano, kiu persone parolis al la kreinto de Esperanto.

Inter aliaj personoj ĉeestis la kunvenon la konata brazila verkisto Carlos Mahul, kiu skribis artikolon pri la solenaĵo en *Jornal do Commercio*, la teatra verkistino Dora Maria, aŭtorino de la teatraĵo *A Estrela da Esperança* (La stelo de la espero) pri la vivo de Zamenhof.

Krom *Jornal do Commercio* la gazeto *O Globo* publikigis informon pri la parolado.

Lasta Kunveno de Aprilo

La 22-an de Aprilo S-ro Lazarus Brieger, kiu konis Zamenhof-n en la Kongreso de Berno, parolis pri siaj impresoj de tiu renkontiĝo.

En la dua parto de la kunveno okazis la Oratora Konkurso kies temo estis "Zamenhof kaj lia vivo".

Du kandidatoj sin prezentis, S-roj João Olívio de Mello kaj Acacio Matos Cavalcanti, kiuj, laŭ decido de la juĝa komisiono, estis egal-kondiĉaj. Ambaŭ ricevis kiel premion la biografion de la fama brazila oratoro Rui Barbosa, de Fernando Nery, en traduko de Jozefo Joels.

El la Programo

— En la 10-a de Aprilo la Federacia Deputito Pastro Mederos Neto proponis en la Ĉambro de la Deputitoj en Brasilia solenan memorigon por la 14-a de Aprilo. En tiu ĉi lasta dato la Deputito faris longan paroladon honore al Za-



Prof. Mello e Sousa



S-ro Brieger

menhof, kies kompletan teks-ton ni publi-
gos en la plej proksima nume-
ro. S-ro Medeiros Neto estis
interrompita de la Deputitoj
Paulo Freire, Paulo Campos
kaj Eugenio Doin Vieira. Tiu
lasta, nia samideano, parolis
en Esperanto.

— En la 14-a de Aprilo je la
10-a vespere en Rádio Nacional
la programo “Grande Teatro
Orniex” sub la reĝisorado de
Floriano Faissal elsendis la tea-
trajon *La Stelo de la Espero* de
Dora Maria adaptita al la
radio de Jeane

nette Clair. La elsendo de tiu teatra-
jo, kiu prezentis la vivon de Zamenhof,
estis repetita en dimanĉo, la 16-a, je la
8-a matene.

— En la 28-a de Aprilo je la 5-a,
Brazila Instituto pri Medicina Historio
honoris la memoron de Zamenhof en
solena kunsido, sub la prezido de D-ro
Ivolino de Vasconcellos. Estis la ora-
toro Prof. Paulo Arthur Pinto da Ro-
cha kaj en la nomo de Brazila Espe-
ranto-Ligo parolis D-ro Carlos Doin.

Esperanto no Estrangeiro

Japão — Na série “Personalidades do Mundo” apareceu recentemente, em tradução de T. Hudjimoto e T. Umesao, a biografia *Vida de Zamenhof* de Edmond Privat. A primeira tradução desta obra para o japonês é de K. Matsuzaki, publicada em 1930.

Itália — A indústria de veículos FIAT acaba de produzir o terceiro e quarto

filmes, em cores, narrado em Esperanto. Títulos: *Operação Segurança* e *Fiat 124*. As organizações esperantistas poderão recebê-los graciosamente, em tamanhos 8 mm ou 16 mm, da Direção Stampa e Propaganda Fiat, Turim, Itália. Também foram publicados, em Esperanto, brochuras sobre o Fiat 124 e a Exposição Internacional de Automóveis, de Turim.

Holanda — Comemorando os 60 anos de fundação da Sociedade Esperantista de Roterdão, a agência de turismo da cidade editou belíssimo prospecto em cores (*Rotterdam invitas vin*) com fotos e dados históricos em Esperanto. Os interessados devem solicitar o prospecto a: V.V.V. Stadhuisplein 19, Rotterdam — 1, Holanda.

Holanda — A revista “Kontakto”, publicada pela Organização Mundial da Juventude Esperantista (TEJO), tem agora novo redator: Stefan Maul, Huberstusstrasse, 2.^a 625 Limburg/Lahn, Alemanha. A esse endereço devem dirigir-se as redações de outras revistas, para troca de exemplares.

Suécia — A empresa de Turismo Göteborgs ogh Bohus Läns Turisttrafikörbund, do Drottningtorget, Göteborg, Suécia, publicou excelente prospecto colorido, em Esperanto, sobre a região litorânea Bohuslän, famosa por suas praias, balneários e excelente clima. Vale a pena conhecer o prospecto, que pode ser obtido por encomenda, no endereço acima.

— O Instituto Sueco de Relações Culturais com Países Estrangeiros pretende incluir o Esperanto entre os idiomas usados para publicação de material informativo sobre a Suécia. Para que seja acelerada essa decisão, devem os esperantistas escrever ao Instituto, solicitando informações, em Esperanto, e pedindo prospectos informativos na Língua Internacional. Endereço do Instituto: Postfako 3306, Stockholm 3, Suécia.

Colômbia — O *Verda Stelo Klubo* de Cartagena, fundado em maio de 1966, deseja manter contacto com outras associações esperantistas, para intercâmbio de cartas e publicações. Endereço: Apartado Aéreo 12-03, Cartagena, Colômbia.

Alemanha — A revista *Der Chemisch-reiniger und Fäber*, editada em München, sobre lavagem a seco e tintura de roupas, está publicando resumo, em Esperanto, de seus artigos.

Brazila Kroniko

Goiás

Goiânia — Estas enoficigita nova estraro de Goiás Esperanto-Klubo: la prezidanto estas prof. D-ro Raul Conde, katedra profesoro pri Homa Anatomio ĉe la Federacia Universitato de Goiás. En tiu sama urbo ekfunkciis 4 esperanto-kursoj, direktataj de S-roj ing. José Expedito Castel, D-ro René Ramos, Umberto Ferreira kaj Manuel de Carvalho.

Rio de Janeiro

Barra Mansa — Esperanto estas instruata en Lernejo "Saturnina de Carvalho", unu el la fakoj de *Centro Espírita Filhos da Luz*.

Paraná

Londrina — La 22-an de Oktobro estis fondita esperanta societo alnomita *Esperantista Ligo de Londrina*. La kerno de tiu grupo estas la kurso gvidata de profesoro Dino Zambenedetti, el "Colégio Londrinense", kiu ĉiusemajne prelegas al pli ol 40 gelernantoj, en la sidejo de *Colégio Vocacional Filadélfia*. Leteroj, informoj, propagandiloj kaj ĉiaj esperantaj estus kore akceptataj de la nova societo.

Santa Catarina

Criciúma — S-ro Walter Quadros, esperantisto kaj skoltisto, okazigis ekspozicion pri la Internacia Lingvo en montrofenestro de konata magazeno de tiu urbo. Okaze de la vizito de la loka skolta grupo al la najbara urbo Araranguá, S-ro Quadros parolis pri la signifo de la esperanto-movado kaj ties rilatoj kun Skoltismo kaj Rotary.

Rio Grande do Sul

Pôrto Alegre — Jen la nova estraro de Esperantista Societo de Pôrto Alegre por la jaro 1967-a: Prez.: D-ro Ernani Dias Corrêa; Vic. Prez.: D-ro Modesto Belmonte de Abreu; Unua Sekr.: Ary

Zamora; Dua Sekr.: Ivan Barbosa; Kasisto: Germano Meinhardt; Bibl.: D-ro Alcides Cardia. Al la novaj estraranoj ni deziras sukcesplenan agadon.

Rio Grande — La *Esperanta Societo de Rio Grande* regule okazigas kursojn en sia sidejo kaj en *Spiritismo Centro Kadec*. S-ro Manuel Torres Abreu, membro de ESRG, faris paroladon pri la bezono enkonduki la Internacian Lingvon en la lernejojn, dum kunveno en la loka *Rotary Klubo*.

Aperfeiçoe a seu Conhecimento

FILATELO

Rodrigo Otávio

La Filatelo estas okupo plena de intereso kaj kuriozaĵo, kiu havigas tute novajn kaj mirigajn ĝojojn, kiu etendas la rondon de utilaj rilatoj, kaj aŭtomate instruas geografion, historion, numismatikon, kaj eĉ propran scion de portretoj de reĝoj kaj ŝtatestroj, kaj de la plej karakterizaj pejzaĝoj de la diversaj landoj.

Tamen, la plej meritplena utilo, kiu devenas de la kolekto de poŝtmarkoj, estas trudi al la persono la persistan senton. *l'esprit de suite* de la Francoj, kiu sendube estas unu el la fundamentaj elementoj de sukceso de la homaj entreprenoj. Oni ne pretigas kolekton de poŝtmarkoj per unu fojo; ĝi estas vivdaŭra tasko; oni serĉas poŝtmarkojn per intersaĝo, kelkfoje pere de abunda korespondado kun malproksimaj landoj; oni pretigas kaj alfaras la folion de la albumoj, ĉar novaj poŝtmarkoj aperas kaj devas esti kolektitaj; oni traserĉas, ĉasas, persekutas la mankantan ekzempleron; oni anstataŭigas ekzemplerojn difektitajn per aliaj perfektaj; ĉio tio ĉi devigas al klopodo, al persisto kaj pacienco, al konstanta alvoko por la sekventa tago. Kaj ĉio ĉi kreas animstaton, kiu iaforte akirita rilate la poŝtmarkojn, kompreneble plifortiĝas en la spirita kreado de la kolektanto, kaj fine konsistigas unu el la plej utilaj elementoj de lia karaktero.

Trad. C.C.

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

60-a Datreveno de B.K.E.

Memore al la fondo de Brazila Klubo "Esperanto" okazinta la 29-an de Junio 1906 fare de Everardo Backheuser kaj aliaj pioniroj, ĝiaj membroj kunvenis la 9-an de Julio kaj la 20-an de Aŭgusto de la pasinta jaro.

En la unua tago okazis la elekto de la estraro (publikigita en la antaŭa numero de B.E.). S-ro Gilson Villas Boas Passos, sekretario de Associação Capixaba de Esperanto legis emocie la artikolon de la unua numero de Brazila Esperantisto (1907) pri la apero de nia klubo kaj S-ro Accacio Mattos Cavalcante legis de la sama revuo artikolon pri la jubileo de B.K.E.

En la dua tago agrabla tagmanĝo en nia sidejo mem plezurigis la membrojn de B.K.E. Parolis la prezidanto de la Klubo Prof. J. B. Mello e Sousa rememorante la unuajn paŝojn de Esperanto en Brazilo. F-ino Martha Seyr legis la paroladon de la antaŭa tagmanĝo kaj kiel raportontinon oni aklamis F-ino Floripes Mendes Castilho. Dun la kunveno de la 5-a ĝis la 6-a horo estis prezentita diversaj historiaj kaj literaturaj tekstoj el Brazila Esperantisto, ĉiuj rilataj al la klubo aŭ verkitaj de ties anoj. En tiu okazo, D-ro Luis de Azeredo Coutinho, eminenta esperantisto el Belo Horizonte kaj membro de la Decida Konsilantaro de B.E.K., legis du tradukaĵojn de Nuno Baena, unu el la pioniroj de B.K.E.

Tiel, en maniero simpla oni celebris la daton, reiefigante la seninterrompan laboron de Brazila Klubo "Esperanto" por nia idealo.

Liga Brasileira de Esperanto

Assembléia Geral Ordinária

A Liga Brasileira de Esperanto reuniu-se, na forma dos estatutos, em 29 de abril último, às 17 horas, em Assembléia Geral Ordinária, sob a presidência do Prof. Dr. Carlos Domingues.

A reunião foi secretariada pelo Dr. Joel Vasques Manso, segundo secretário, e compunham a mesa, além dos mencionados, D. Irani Baggi de Araujo, tesoureira, Dr. Floriano Pessoa, primeiro secretário, e Sr. Luiz Alberto Martins, secretário geral.

Após a leitura da ata, aprovada sem discussão, foram lidos o Relatório e o Balancete referentes ao ano de 1966, ambos aprovados por unanimidade, sendo de notar que o Balancete está publicado neste número do *Brazila Esperantisto*.

Procedeu-se, em seguida, à leitura do telegrama passado ao Presidente da Liga pelo Deputado

Brazila Klubo "Esperanto" estas la loka grupo de la urbo Rio de Janeiro kaj estas malfermita en la labortagoj de la 8-a ĝis la 18-a. La kunvenoj okazas sabate de la 14-a ĝis la 18-a. Adreso: Praça da República, 54, 2.º etaĝo; tel.: 42-4357.

KURSOJ

En Marto de la kuran-
ta jaro komenciĝis Elementa kaj Supra Kursoj de Esperanto sub la gvido de S-roj Luiz Alberto Martins kaj Floriano Pessoa respektive. Por la Elementa Kurso estas uzata la 7-a eldono de *Curso de Esperanto em Vinte Lições*, kiun je la unua fojo oni uzis en la kurso de la pasinta jaro kun tre bona rezultato.

Medeiros Netto, nos seguintes termos: "Agradeço a eminente patricio amigo generoso felicitações me dirigiu pelo discurso ensaio homenagens Câmara por mim promovidas ao celebrarmos cinquentário morte inesquecível criador Esperanto Dr. Lázaro Luiz Zamenhof".

A Assembléia aprovou votos de pesar pela morte dos consócios Irene de Araújo Monzon Abril, Alcir de Carvalho, Pedro Emanuel Simon e Sebastião Augusto.

Nekrologo

Monsinjoro Benedito Marinho

Mortis en Rio de Janeiro la 9-an de Oktobro de la pasinta jaro Monsinjoro Benedito Marinho.

Fama katolika oratoro li faris brilan salutan predikon dum meso okazinta en la 6-a Brazila Kongreso de Esperanto.

ANTARKTIKA FAŬNO KAJ FLORARO

*En la frosta suda maro
La balen' per buŝosaro
Kriblas la planktonan stokon
Sed kiu ŝatus manĝi fokon?*

*Langusteto tre bongusta
Estas por la fiŝ' ŝtonbrusta
Li suferus eble mokon
Sed kiuj ĉasus belan fokon?*

*En sistem' ekologia
Al fiŝo venas sorto sia
Aĉa skuo raŭkas vokon —
Neniu ne amas la fokon.*

*Pingven' bezonas protektadon
Li ne ŝatas inspektadon
Sed necesas bona roko
Por la pel — (aŭ Rossi) foko!*

*En kunvenoj pri logistiko
Venas maso da statistiko
Hundoj, sledoj havas lokon
Sed ne forgesu la fokon.*

*Sendadu fulme radiaĵojn
Ĉiuhore tra staciojn
Informaĵojn samepokan
Tamen ne genu etan fokon!*

*En turist-ekspedicioj
Ne estu tro da ambicioj
Ni manĝu bovon, porkon, kokon
Sed ne la povran etan fokon.*

*Estu foko ĉiuspeca
Sekur', trankvila kaj soleca
Atentu mian finalvokon:
Ne estu malamiko de la foko!*

Ralph Harry

Rim.: — Pere de S-ro M.E. Steven. Sekretario, ni ricevis tiun poeziaĵon de S-ro Ralph Harry Eksterordinara kaj Plenpova Ambasadoro de Aŭstralio, kun jena dediĉo:

“Al miaj amikoj en Rio de Janeiro por rememorigi la okazon, la 23-an de Novembro 1966, kiam mi parolis la internacian lingvon, Esperanto, kun la Ambasadoro de Sovetunio, S-ro Mikhaïlov, kaj pri Esperanto al la Ministro de Eksterlandaj Aferoj.”

Ralph Harry,
Ambasadoro de Aŭstralio en
Bruselo ĉe la Reĝoj de la Belgoj
kaj ĉe la Eŭropaj Komunumoj.
Rio de Janeiro, la 23-an de
Novembro, 1966.

Recenzo

*Peter Karvaš — Meteoro. Teatraĵo
en 3 aktoj — Tradukis Vladimir
Gazda — Deliza — Bratislava —
1963. — Broŝ. 60 p. 13x20. Multobli-
gita. Prezo en la libroservo de B.E.L.
NCr\$ 2.10.*

Ĉi tiu teatraĵo kontraŭmilita estas viveca kaj facile prezentebla, ĉar estas nur 5 rolantoj kaj la scenejo estas plej simpla.

En la libro mankas priskriboj de la scenejoj. Ĉiu sceno devus komenciĝi per priskribo de la scenejo kaj de la ĉeestantaj rolantoj.

Estas kelkaj tajpistaj eraroj, sed ne gravaj por la legado. La lingvo estas bona. Veran eraron ni rimarkis nur unu: la verbo *darfi* en la senco de *povi* aŭ *rajti*.

*Ferdo Skrljac — Basnice — Fable-
toj por etuloj kaj plenkreskuloj. El
la kroata tradukis Josip Valebit —
Zagreb 1962. Ilustrita broŝuro. 48 p.
15 x 17 cm. — Prezo en la libroser-
vo de B.E.L. NCr\$ 2,80.*

La tuta libro estas dulingva: klara Esperanto kaj malluma kroata. Ĉiuj fabletoj estas mirindaĵo de koncizeco: ordinare nur du sessilabaj kvarversetoj. Mi neniam estis supozinta en la kroata tiajn altvalorajn kulturverkojn. La lerteco de la tradukinto ankaŭ estas mirinda. Ĉiu en la libro — bildoj kaj tekstoj — estas verde presita.

La komparo de la du lingvoj montras la nepran neceson de Esperanto, ĉar la kroata estas grava kulturlingvo, kvankam al ni ĝi ŝajnas tute barbara. Certe ankaŭ nia nacia lingvo al kroatoj ŝajnas barbaraĵo.

Mi gratulas la talentan tradukinton pro lia majstra uzado de Esperanto en tiaj malfacilaj versetoj.

I.G.B.

*El Afriko — Legu kaj lernu — Bro-
ŝuro por infanoj. Ilustrita. Muzik-
notoj por 4 kantoj. 24 p. 11 x 17 cm.*

Ĝi estas inica numero de serio. Redakcio: Derrick P. Faux — Valley Farm House, Charndon, near Bicester Oxon. Anglujo. Prezo en la libroservo de B.E.L. NCr\$ 1,05.

En tre bona Esperanto oni tie multe rakontas al infanoj pri bestoj, birdoj, kutimoj de Afriko. Preseraron mi trovis nur unu: en la paĝo 23 estas: "Ĝi dependiĝis..." anstataŭ: "Ĝi sendependiĝis..."

En flava flugfolio estas interesa demando mandaro pri la teksto de la libreto.

Ĉiu esperantista infano legu tiun belan libreton kaj lernu la novajn vortojn, kiujn li tie trovos.

I.G.B.

FINGRULINO — Laŭ Chr. Andersen — Bildoj de Gerda Born — Elgermanigis — H. Sirk — Kartonbindita — plurkolore ilustrita. Formato 12 x 11 cm. — Eldono de Waldheim-Eberle — Wien. — Prezo en la libroservo de B.E.L. NCr\$ 1,05.

Ĉarma fabelo plej bele ilustrita per multkoloraj bildoj, ĉi tiu libreto plaĉas ne nur al infanoj, sed ankaŭ al maturaj homoj. La traduko ŝajnas al mi tre bona kvankam ĝi ne esta farita rekte el la originalo, sed pere de la germana lingvo.

I.G.B.

Sooseki Macume — LA TURO DE LONDONO — Rakonto — El la japana originalo tradukis Seiho Nishi — Eldono de la 47-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj — Maebaŝi 1960. Broŝuro 56 p. 13 x 18 cm. — Prezo en la libroservo de B.E.L. NCr\$ 1,40.

La "Turo de Londono" estas granda kastelo kun pluraj turoj. Kelkaj el tiuj estis iam politikaj malliberejoj kaj ekzekutejoj, kie pereis reĝoj, princoj kaj aliaj nobeloj; tial la klera Aŭtoro fantazias en tiuj prizonoj longan tempon de la Historio de Anglujo kaj prezentas al ni tre kortuŝajn rakontojn pri senkapigo de gravaj eminentuloj kaj ĉarmaj virinoj.

S-ino Yaeko Nogami, disĉiplino de la Aŭtoro, aldonis longan komenton al la verko, post vizito, kiun ŝi ankaŭ faris al tiu malnova kastelo.

La Aŭtoro estas klera kaj havas riĉan stilon, tial li donas al ni vere eminentan libron.

La traduko estas tre bona.

Entute libro tre leginda.

Seiho Nishi — NIA KORPO — Anatomio kaj fiziologio de la homo por laikoj — Broŝ. 105 p. 15x21 cm. — Eldonis Gumma Esperanto-Societo — Maebaŝi — Japanujo — 1961. — Prezo en la Libroservo de B.E.L. NCr\$ 7,00.

La eminenta Aŭtoro estas D-ro Med., Emerita Profesoro de Tokyo Universitato, iama Rektoro dum 15 jaroj de la Gumma Universitato.

La libro estas plena de ilustraĵoj por helpi la komprenon de la teksto.

La formado de la homo efektiviĝis per evoluado de la vivantaj estuloj tra nekalkuleble longaj periodoj de la vivo sur la Tero. Kaj espereble tia progresado daŭros senfine!

La klera Aŭtoro estas tre kompetenta pri la temo de la libro kaj ĉion tre detale klarigas. En la fino de la libro li donas glosaron de neologismoj kaj listo de preseraroj.

Ĉiu esperantisto en la mondo devas fieri, ke tia fama sciencisto verkis sian gravan libron rekte en Esperanto. Li montras, ke la L.I. por la scienco jam estas en praktika uzado tra la mondo. — Gratulojn kaj Dankojn!

I.G.B.

Jean Forge — LA VERDA RAKETO — satira novelaro el Esperantujo. — 148 p. 20 x 12,5 cm. Eldono de KOKO, Kopenhago, 1961. — Prezo en la libroservo de B.E.L. NCr\$ 10,50.

Jean Forge estas mondfama pseŭdonimo de la pola filmreĝisoro Jan Fethke, naskita en 1903.

Kiam li estis 20-jara, t.e. en 1923 aperis lia unua fikcia romano *Abismoj*; en 1924 aperis *Saltego trans jarmiloj*. Lia plej fama verko estas *Mister Tot acetis mil okulojn*, aperinta en 1931.

La *Verda Raketo* estas do verko de famulo. Ĝi konsistas el 10 partoj. La unua estas longa, tre sprita letero de Julio Baghy, kaj la naŭ ceteraj estas rakontoj el Esperantujo, preskaŭ ĉiuj delikate erotikaj de senbrida fantazio.

La nomo estas de la lasta novelo, kiu rakontas pri interplaneda vojaĝo de esperantistoj en giganta raketo, de la Tero, en la Sunsistemo "A", al la planedo Pax, en la Sunsistemo "B", kiu estas malpli granda ol la nia.

Tiu vojaĝo efektiviĝas kelkajn jarcentojn post nia epoko.

Por ripozigi la cerbon estas tre agrable legi libron pri kies asertoj oni tute ne povas kredi, eĉ ne kiel ideala moralo.

Bele bindita, bona papero, lingvo perfekta, la libreto faros plezuron en ĉiuj bibliotekoj.

Jean-Paul Sartre — LA NAŬZO — Romano — El la franca lingvo tradukita de Roger Bernard — Serio Oriento-Okcidento, n-ro 3 — sub la Aŭspicioj de U.E.A. en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O. — Eldono de Universala Esperanto-Asocio — Rotterdam 1963. 1 vol. bele bindita — 222 p. 14 x 20 cm. Prezo en la libroservo de B.E.L. NCr\$ 17.50.

Kvankam en la titolpaĝo estas la vorto "Romano", en la libro ne estas ia intrigo kiel en romanoj. Ĝi estas longa diskutado pri ekzistado aŭ neekzistado de la estaĵoj. La Aŭtoro estas fama pri la filozofio de Ekzistencialismo, kiun la Suplemento de la Plena Vortaro difinas jene:

"ekzistencialismo. Doktrino, laŭ kiu la homo, kies ekzisto estas komence preskaŭ nur metafizika, kreas sin mem per elekto inter la diversaj eblaj agoj kaj per plenumado de tiuj agoj: por tiu skolo, ekzisto anstataŭas esencon."

La libro estas tre zorge farita kaj la lastaj paĝoj prezentas al ni plenan liston de vortoj ne troveblaj en la Plena Vortaro kaj ĝia Suplemento.

Kiel "Enkonduko" estas longa artikolo de Prof. D-ro Ivo Lapenna pri tiu kolekto de libroj.

Bela foto de la Aŭtoro aperas en la paĝo 9. Supozeble ĉi tiu libro estas multe grava, ol mi povas kompreni.

I.G.B.

SANKTA NIKOLAO EN NEDERLANDO — de Teo Ramaker kaj kelkaj amikoj de li. Traduko de Julia Isbrücker — Eldono de la Internacia Esperanto-Instituto — Den Haag — Nederlando. Broŝuro 40 p. 13x19 cm.

— Prezo en la libroservo de B.E.L. NCr\$ 2,10.

Sankta Nikolao en Nederlando estas tre simila al Paĉjo Noel en Brazilo: en la nokto de lia naskiĝo li disdonas belajn donacojn al la infanoj, kiuj lasas siajn ŝuojn apud la kameno por tiu celo.

Lia naskiĝo estas en la 5-a de Decembro.

La libreto estas tre talente preparita kun belaj ilustraĵoj kaj muziknotoj kun poezio de belaj kantoj. Kelkaj el tiuj kantoj estas dulingvaj: nederlande kaj Esperante.

Tre grava kulturlibreto, kiun mi rekomendas ne nur al infanoj, sed ankaŭ al maturaj homoj, al ĉiuj kleraj legantoj.

Islandaj Pravoĉoj — Tri rakontoj kaj unu poemo el antikva Islando — Tradukitaj de Baldur Ragnarsson. — Eldono de Eldona Societo Esperanto — Malmö — Svedujo — 1964. 110 p. 12x18 cm. Prezo en la libroservo de B.E.L. NCr\$ 5,95.

En sia longa "Enkonduko" la tradukinto prezentas al ni detalan historion de sia patrolando kaj de ties literaturo.

Estas tri belaj rakontoj en prozo pri bataloj, duelo k.a. La lasta parto de la libro estas la longa poemo "Antaŭdiro de la Aŭguristino", kiu rakontas en versoj pri la kreo de la mondo, ĝia progreso, ĝia malboniĝo kaj fino, laŭ la Islanda Mitologio. Pluraj paĝoj da notoj klarigas la poemon al laikoj pri tiu Mitologio.

Baldur Ragnarsson estas tre talenta kaj aktiva. Li sola diskonigas tra la mondo sian patrolandon per tradukaĵoj de ĝia literaturo. Pri aliaj esperantistoj en Islando mi ne scias.

Gösta Henriksson. — El la Vivo de Ludoviko Zamenhof — broŝuro 16 p. 12x18 cm. — Eldono de Eldona Societo Esperanto — Malmö — Svedujo. — 1964. — Prezo en la libroservo de B.E.L. NCr\$ 2,80.

Bonega libreto pri la juneco de Zamenhof. Ĝi rakontas al ni la vivon de la junulo nur ĝis lia edziĝo, kaj en tiuj 26 jaroj estas multe grava kaj kortuŝa. Stilo facila por lernantoj de la lingvo, la libreto al ĉiuj plaĉas. Ni gratulas la talentan Aŭtoron.

I.G.B.



El nia arkivo: en la komenco de la jarcento L. L. Zamenhof kaj amikoj.

Anúncios

Lápis

Vende-se lápis com dizeres alusivos ao Esperanto; eficaz para divulgação da Língua Internacional. Preço NCr\$ 0,15. Preços especiais para umá dúzia ou mais. Encomenda: Liga Brasileira de Esperanto, Praça da República, 54, 2.º andar.

Alfinete

Todo esperantista não deve deixar de usar. Há dois tamanhos: pequeno e grande; preço único: NCr\$ 1,50. Pedidos à Liga Brasileira de Esperanto.

Livros

Vende-se *Historio de la Lingvo Esperanto*, famosa obra do escritor suíço Edmond Privat. Volume ricamente encadernado: NCr\$ 11,20.

Acaabam de chegar novos exemplares do *Katalogo de Elektitaj Libroj en Esperanto*, valioso documento ilustrado, como prova da vitalidade do Esperanto e de sua literatura. Preço no Libroservo de B.E.L. NCr\$ 3,50.

Taglibro de Anne Frank é um dos mais famosos e comovedores livros da literatura mundial. Recomendamos aos que já leram a obra em português, pois poderão apreciar a superioridade da tradução de G. J. Degenkamp. Preço no Libroservo de B.E.L. NCr\$ 11,90.

Um dos mais completos manuais elementares é o *Curso de Esperanto em 20 Lições*, de A. Couto Fernandes e Mota Mendes, agora em 7.ª edição inteiramente revista. Preço no Libroservo de B.E.L. NCr\$ 1,50.

Encontram-se a venda no Libroservo da Liga Brasileira de Esperanto algumas das famosas traduções de Zamenhof: *Georgo Dandin* de Molière, NCr\$ 5,60, *La Rabistoj* de Schiller, NCr\$ 7,70, *La Revizoro* de Gogol, NCr\$ 5,60.

Cursos

A Liga Brasileira de Esperanto mantém Cursos por Correspondência de três graus com diplomas, conferidos em nome da Academia de Esperanto: *Curso Elementar* (10 lições), com o cartão de matrícula do aluno recebe o livro adotado e fica inscrito no Movimento na categoria AM. Taxa única: NCr\$ 20,00. *Curso Superior* (15 lições), taxa única: NCr\$ 30,00. *Curso Magistral* (20 lições), taxa única NCr\$ 40,00. A contribuição para cada curso é paga adiantadamente e de uma só vez.